

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Lida Elbakjan

Dimitrije Janičić

Marija Jerković

Ilona Koutny

Katalin Kováts

Radojica Petrović


Svetlana Smetanina

Martin Strid

Renée Triolle

Josef Vojáček

Yu Jianchao



Nyíregyháza

"betulejo"

atendas vin!



ilei

ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN):.....	3
Ilona KOUTNY: <i>Instruista trejnado: kial, kiel, kie?</i>	4
<i>Estrarkunsido de ILEI</i> (Mireille GROSJEAN)	9
Katalin KOVÁTS: <i>Oni Ekparolis ĉe edukado.net</i>	11
Luiza CAROL, Mireille GROSJEAN: <i>Dek jaroj en Esperanto-lando</i>	14
Lida ELBAKJAN, Mireille GROSJEAN: <i>Estu ni diligentaj lernantoj</i>	18
YU Jianchao: <i>Mia instruisto Li Shijun (Laŭlum)</i>	21
<i>El la landoj kaj sekcioj</i> (CZ, FR, HU, RU, RS).....	24
Marija JERKOVIĆ: <i>Oklingva medicina vortaro enciklopedia</i> (recenzo)	29
<i>Por via notlibro</i>	31
<i>Kial ni ĉendancu baladojn?</i> (Martin STRID)	32
<i>Farandolo en Nyíregyháza</i> (Mireille GROSJEAN)	35
<i>La 49-a konferenco de ILEI: loĝprezroj kaj mendilo</i> (Radojica PETROVIĆ)...	37
<i>Informoj pri ILEI</i>	40

ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Rilatoj kun Unesko kaj FIPLV. Observanto de ILEI ĉe UEA. Informado al ekstero. Ekzamenoj.
- Vicprez.:** GONG Xiaofeng „Arko”, School of Environmental and Chemical Engineering, Nanchang University, CN-330031 Nanchang, Ĉinio. <arko.gong@qq.com>. Universitata agado.
- Sekretario:** Emile MALANDA NIANGA. P. O. BOX 2787 Cape Town 8000, Sud-Afriko. <emalandan@yahoo.fr>, <ilei.sekretario@gmail.com>. Kontakto kun sekcioj. Koleghelpa Kaso.
- Vicsekr.:** Elena NADIKOVA. ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>. Lerneja agado. E-centroj.
- Estrarano pri financoj:** William HARRIS „Vilĉjo”, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.
- Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Konferencoj, rilatoj kun TEJO, retaj aferoj, „Interkulturo”.
- Estrarano:** Ivan COLLING. Cx.P. 1701, Ag. Mal. Deodoro, Curitiba, PR. BR-80011-970, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah; AdE¹

Renato Corsetti, Britio/Italio,
Università degli Studi di Roma „La
Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Pona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu

Stefan MacGill, Nov-Zelando/
Hungario, vic-prez. de UEA

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяй-
ственного Машиностроения;
AdE¹

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Titolpaĝe: *Nyíregyháza atendas vin*
(vd. p.37.). **Dorskovrile:** *la malnova*
urboplaco de Poznano (vd. p.4)

Enkonduko

Karaj legantoj,

Jen por vi la nova numero, 2016/2, de *Internacia Pedagogia Revuo*, la organo de ILEI, tio estas ĝia voĉo. Tiu revuo nun disiras al 70 landoj, kie ILEI havas aŭ sekcion, aŭ reprezentanton aŭ kontaktpersonon¹.

En ĉi tiu numero vi ekscios pri venontaj eventoj, kiuj skuos niajn kutimojn, kiuj gvidos nin al pensado pri nia aktivajoj, kiuj konsistigas grandan kuraĝigon por la Ligo. Kiel ĉefartikolo staras teksto de Profesorino Ilona KOUTNY pri lertigado de instruistoj, la kerna celo de ILEI. Grava venonta evento tiurilate estas la unujara kurso en Poznano, PL, kiu komenciĝos en septembro 2016. Do ek al aliĝo!

Kadre de la raporto pri la ĵus finiĝinta estrarkunsido vi legos pri la *Jaro de la Lernanto*. Giganta defio por la Ligo. Defio al ĝia estraro, al ĝia komitato, al vi ĉiuj niaj membroj. Temas pri tutjara strebado de ILEI al pli efika laboro, al novaj taskoj. La *Jaro* ankaŭ donos okazojn por renkonti unu la alian, lertiĝi kune por pozitive subteni la lernadon de komencantoj kaj plenumi iliajn bezonojn.



¹ La cifero 70 ligiĝas ankaŭ kun alia evento. Post la alveno de la lastaj korektoj, ni fermis la numeron ĝuste kiam Mirejo festis sian 70-an naskiĝtagon. La redakcia skipo de IPR kaptas tiun okazon por deziri al ŝi sanon, ĝojon kaj sukceson en ŝiaj multaj entuziasmaj agadoj por Esperanto.

Ni ne plu devas nur instrui kiel gebirdoj nutras siajn idojn plenigante iliajn bekojn. Nia rolo evoluas... Eble ni devos pripensi pri nova logotipo... Eble ni devos pripensi pri nova nomo... Dum plena jaro ni provos krei novajn strukturojn kun la celo doni al la Ligo efikan laborkadron. Laŭ la decido de la estraro ni metos en la tagordon de la komitatkunsido en Nyíregyháza punkton pri kreo de laborgrupo por statutŝanĝo.

Kie nia 50-a Konferenco okazos en 2017, ni ankoraŭ ne scias. Sed ni scias, ke okaze de ĝi ni voĉdonos pri tiu nova statuto. Kaj espereble tiam ILEI havos mil membrojn!!! Nova ILEI, forta ILEI!! Helpu al tio!!

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

Instruista trejnado: kial, kiel, kie?

Dr. hab. **Ilona KOUTNY**, prof. UAM en Poznano, Pollando.
Gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj.
Gvidanto de la Finn-Ugra Katedro.
Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano, Pollando.
Lingvisto, lingvoinstruisto

Mallonge: La artikolo klarigas kial instruista trejnado estas grava por instruantoj de Esperanto kaj kial la oficiala formado necesas por entrepreni la instruadon en diversgradaj lernejoj. La aŭtorino skizas la bezonatajn konojn por profesie instrui Esperanton. Ŝi prezentas la diversajn eblojn ofertatajn al instruistoj en la Esperanto-movado kaj pli detale priskribas la unujaran studadon en Poznano (Pollando) ĉe UAM, kadre de la interlingvistikaj studoj, kiu disponigas la plej altnivelan diplomon/atestilon pri instruado de Esperanto.

Kial instruista trejnado?

Esperanto estas facila lingvo, eblas ĝin lerni rapide. Post unujara lernado jam eblas instrui ĝin. – Ni povas aŭdi tiajn opiniojn. Estas vero en ĝi, tamen... Pro la logikeco kaj produktiveco de la lingvaj reguloj, eblas regi la gramatikan sistemon kaj kompreni sufiĉe multe el esperantaj tekstoj post mallonga lernado. Sed oni povas renkonti ankaŭ malnovajn esperantistojn ĉe kiuj la prononco (usoneca, franceca aŭ alia) hirtigas niajn orelojn, aŭ la forgeso pri akuzativo kaj malbona uzo de (ne)transitivaj verboj, se ne paroli

pri participoj ĝenas nian gramatikan senton kaj povas rezultigi miskomprenon. Por bona aktiva uzo tamen necesas ekzercado, konscia praktika uzo de la lingvo! La facila lernebleco de iu ajn lingvo dependas ankaŭ de la diferenco inter la lernata lingvo kaj la gepatra lingvo de la lernanto, tiel ankaŭ Esperanto havas pli malfacilajn flankojn por certaj parolantoj (vd. mian artikolon: Ĉu facila lingvo facile lerneblas?).



Interlingvistika grupo 2011-14 (inter ili Mirejo Grosjean kaj Ilona Koutny)

La lingvokono bezonas maturiĝon por ke iu komencu instrui. Eĉ bona lingvokono ne sufiĉas por instruado, sed ankaŭ bonaj metodoj necesas. Iu povas havi naturan kapablon por instrui, tamen ĉiam eblas kapti novajn ideojn kiel pli efikigi kaj interesigi la lecionojn, ekkoni novajn lernmaterialojn, novajn perspektivojn, kiuj utilos al niaj lernantoj. Kaj tio estas tre bonvena kaze de Esperanto, ja la lernantoj lernas Esperanton por interese pasigi la tempon, pliaĝuloj eĉ eksplicite por ekzerci sian menson (ekz. en la universitatoj de la tria aĝo, vd. Koutny 2016b). Esperanto ne donas tujan profiton, en laborejoj ĝi ne estas bezonata, necesas io kio altiras la atenton, ebligas rapidan progreson kaj agrabligas la lecionojn, por ke la komencantoj de la kurso ankaŭ finu ĝin. Tial la instruisto de Esperanto devas esti pli bona ol instruisto de aliaj lingvoj.

Se iu volas instrui Esperanton ne nur en la loka klubo aŭ esti *onkl(in)o*, reta helpanto por komencantaj Esperanto-parolantoj, sed volas instrui Esperanton oficiale en lernejo, tiam iuspeca diplomo estas necesa, ja ankaŭ por instrui aliajn lingvojn diplomo estas postulata. Tion povas doni deca instruista trejnado kun multflanke ellaborita kaj fiksita programo, kun fina ekzameno.

La instruado de Esperanto en lernejoj certigas bonan statuson por la lingvo. Ĝia manko montras ĝian malfortecon. Se rigardi la statistikon de Edukado.net² evidentiĝas, ke nur en malmultaj lernejoj – bazaj, mezaj aŭ superaj – Esperanto estas oficiale instruata, eĉ se ni alkalkulas, ke parto de la kursoj ne estas tie registrita: laŭ tiu statistiko en 35 lernejoj el 21 landoj lernas 637 lernantoj en la tuta mondo!! Kelkaj el la kursoj – kvankam en la lernejo – estas nur aldonaj kursoj sen poentoj, sen kalkuliĝi al la studobjektoj. Maltrankviliga estas la fakto, ke Esperanto apenaŭ estas instruata en elementaj lernejoj, kvankam ĝian lernfaciligan (propedeŭtikan) efikon tie eblas plej efike eluzi.

Mankas profesiaj instruistoj de Esperanto, kiuj rajtus entute instrui E-on en lernejoj. Se en iu lando la edukadministerio decidus enkonduki Esperanton, eĉ nur eksperimente en kelkajn lernejojn, estus problemo trovi sufiĉe da kvalifikitaj instruistoj.

Kion sciui instruisto de Esperanto?

Bona lingvokono, tio estas bona rego de la gramatiko kaj riĉa vortprovizo, estas la bazo por instruisto (temas pri la C1-nivelo en KER-ekzamenoj). Ankaŭ kulturaj konoj, bazaj konoj pri la Esperantaj literaturo kaj movado estas necesaj. Li/ŝi devas koni la situacion de Esperanto en la mondo por povi doni konsilojn al la freŝbakitaj Esperanto-lernantoj kiel uzi la akiritan scion kaj kiel daŭrigi. Instruisto devas ĉiam pli multe scii ol siaj lernantoj.

Bona instruisto konas diversajn instrumetodojn kaj lernolibrojn, aplikas ilin laŭ la bezono de la instruata grupo: alimaniere lernas infanoj, junaj plenkreskuloj kaj pli aĝaj personoj. La komunika metodo kun rolludoj estas pli alloga ol la gramatika-traduka metodo kaj facile aplikeblas por Esperanto pro ĝia simpla gramatiko. Nuntempe la retaj ebloj estas nepre eluzendaj. Ankaŭ la tradicia movado transformiĝas: apenaŭ funkcias kluboj, male la retlistoj kaj forumoj furoras.

Bazaj metodikaj konoj entenas kiel evoluigi la lingvokapablojn de lernantoj (lego, aŭskulto, skribo, parolo), kiel ellabori ekzercojn kaj testi la lernitan materialon, kiel plani lecionon kaj kurson. Esperanta metodiko enhavas:

- la instruadon de elparolo, adaptitan al la gepatra lingvo de la lernanto,

² http://edukado.net/prie/sinprezento/statistiko?tipo=lernejaj_kursoj,majo_2016

- la instruadon de gramatiko kun speciala atento al problemoj pro la malsimileco de la gepatralingva sistemo (ekz. uzo de akuzativo por tiuj en kies lingvo ĝi ne ekzistas aŭ funkcias iom malsame),
- la instruadon de vortoprovizo kun speciala atento al la plursignifeco en la denaskaj lingvoj de la partoprenantoj, al la eluzo de vortonestoj ktp.,
- la instruadon de bazaj kulturaj konoj pri Esperantio (gravaj aranĝoj, kulturaj centroj ...).

Instruisto devas koni ankaŭ la instruhelpilojn de diversaj lernolibroj, legaĵoj, muzikaĵoj ĝis filmetoj kaj retkursoj, scii pri kursoj, KER-ekzamenoj ktp.

Kompleksa instruista formado prezentas ĉiujn flankojn de la instruado kaj trejnas la partoprenantojn pri ili, konsciigas ilin pri transfero inter la gepatra kaj lernata lingvoj dum la instruprocezo, prezentas ankaŭ la lernfaciligon de Esperanto por aliaj lingvoj. La partoprenantoj mem pretigas ekzercojn, ellaboras instruplanojn kaj lecionplanojn adaptitajn al la kondiĉoj kaj celoj de la kurso, prezentas provlecionon. Fine la kursanoj pretigas laboraĵon pri elektita temo surbaze de fakliteraturo kaj propra esploro. La fina ekzameno testas ankaŭ la konojn de la instruista kandidato pri gramatiko, literaturo, movado kaj kulturo de Esperanto.

Kie akiri instruistan diplomon?

Oficiala kompleksa formado de instruistoj en universitata nivelo – simile al la tiu de aliaj lingvoinstruistoj – okazas nur kadre de la Interlingvistikaj studoj de UAM (Universitato Adam Mickiewicz, en Poznano, Pollando). La 3-jaraj postdiplomaj studoj disponigas ne nur la bazojn de esperantologio kaj interlingvistiko dum la unuaj 2 jaroj, sed ankaŭ bazajn konojn pri lingvistiko kaj komunikado dank’ al la kontribuantaj specialistoj. En la tria jaro okazas specialiĝoj, inter kiuj la lingvopedagogia havas prioritatan rolon. Fine de la tria jaro la gestudentoj defendas sian diplomlaboraĵon kaj ricevas universitatan atestilon pri la plenumo de postdiplomaj interlingvistikaj studoj kun la elektita specialiĝo. Surlokaj sesioj okazas dufoje jare (po unu intensa semajno en septembro kaj februaro), intertempe necesas hejma laboro por la skribaj taskoj kaj pretiĝo por la ekzamenoj. La studoj rekomenciĝas ĉiun trian jaron, la sekva estos en septembro 2017.

Eblas aliĝi al la 3a jaro de la studoj kaj kune kun la universitataj studentoj partopreni la lingvopedagogian specialiĝon, kiu estas nomata instruista trejnado. Por tiuj partoprenantoj krom la metodikaj kursoj okazas ankaŭ

koncizaj kursoj pri gramatiko, literaturo kaj E-movado. La jara kursaro laborigas la partoprenantojn hejme pri konkretaj taskoj kiuj helpas ilian postan instruistan laboron. La akceptita finlaboraĵo kaj la fina ekzameno pri gramatiko, literaturo, movado kaj kulturo estas la postulo por la instruista diplomo de ILEI. Tiu ĉi instruista trejnado realiĝas en la kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, ILEI kaj Edukado.net kaj estas kompleksa formado dum nur unu jaro.

Okazas kompleksa reta instruista trejnado kadre de Edukado.net kun transdono de propra atestilo. Tiun formon eblas kompletigi per la surloka trejnado en Poznano. Ja por bona instrupraktiko necesas viva kontakto kaj praktika instruado kun gvidanto.

Esperanto-instruistojn, kursestrojn kapabligas laŭ modula instrusistemo la Germana Esperanto-Centro (Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo) en kunlaboro kun AGEI, la landa sekcio de ILEI, en Herzberg am Harz (Germanio). Diplomon eblas akiri laŭ la postularo de la Germana Esperanto-Instituto.

Krome okazas mallongaj metodikaj trejnsesioj, lertigoj kun partopren-atestiloj dum konferencoj de ILEI kaj aliaj aranĝoj. Ili ne donas kompleksan instruprogramon, ne postulas aldonan laboron, kaj ne gvidas al fina kompleksa ekzameno. Necessus harmoniigi kaj niveligi la diversajn programojn por ke la instruista diplomo de ILEI restu altkvalita, fidela al la nivelo ellaborita kaj praktikata en universitato. La universitata formado de instruistoj de UAM daŭrigas la tradicion de la budapeŝta universitato ELTE, kie István SZERDAHELYI fondis la Esperanto-fakon en 1966 kaj formis instruistojn dum du jardekoj (vd. Koutny 2001).

Fine

Se esperantistoj serioze intencas pretiĝi por instruado de Esperanto inter oficialaj kadroj, tiam bezonatas instruistoj kun bonaj bazoj kaj iuspeca diplomo. La lingvan bazon atestas la KER-ekzamenoj, kies gravecon jam multaj komprenis. Estas tempo por ke instruantoj iĝu instruistoj de Esperanto kun solida formado kaj rekonata atestilo/diplomo. Nur sur tiu bazo eblas lanĉi la sloganon „Esperanton en lernejojn”.

La instruista trejnado de UAM – kiu okazas nur ĉiun trian jaron – kunlabore kun ILEI kaj Edukado.net atendas kandidatojn por la studjaro 2016/17.

Al la programo kontribuos Katalin KOVÁTS, Zsófia KÓRÓDY, Duncan CHARTERS, Ilona KOUTNY (lingvopedagogio, gramatiko) kaj Renato CORSETTI, István ERTL, Tomasz CHMIELIK, Aleksander KORJENKOV (kulturo, movado).

Kontakto: interlin@amu.edu.pl; <http://www.amu.edu.pl/~inter/>

Bibliografio

Koutny Ilona 2001: Universitata instruado kaj instruista trejnado. IPR 2001/4: 13-21. http://www.ilei.info/ipr/universitata_instruado.htm

Koutny Ilona 2016a: Ĉu facila lingvo facile lerneblas? Pri la komplekseco de esperanto. Aperonta en: Gobbo, Federico (red.): Lingua, política, cultura... New York: Mondial

Koutny Ilona 2016b: Kunlaboro inter diversaĝuloj kadre de la Interlingvistikaj Studoj de UAM. En: Simpozia Kajero 1. Vroclavo

Estrarkunsido de ILEI

Les Brenets (CH) de la 5-a ĝis la 8-a de majo 2016

Nia estraro situas en ĉiuj kontinentoj krom Aŭstralio. Tio estas tre pozitiva fakto por la Ligo. Pro tiu vasta teritorio mi eĉ ne pensis pri fizika kunveno. Tamen en Oostende en 2015 Radojica PETROVIĆ aludis al antaŭa kunvenkutimo, menciis sian emon starigi tian kunvenon kaj montris la avantaĝojn de tia eblo. Ĉiu esploris pri vojaĝkostoj kaj ni alvenis finfine al pli modesta solvo: parto de la estraro kunsidu. Mi proponis akcepti tian kunvenon, tio nuligis la hotelkostojn. Ni provis esti kvar kaj havi kvorumon, tamen tio ne sukcesis.

Elena NADIKOVA kaj Radojica PETROVIĆ, same kiel Stefan MACGILL, vic-prezidanto de UEA, alvenis al Les Brenets merkrede vespere la 4-an de majo. Ili forlasis la ĵurasan vilaĝon lunde/marde la 9-an/10-an. Tiel nia kunveno daŭris kvar plenajn labortagojn. La tagordo estis longa, tamen ni havis abundan tempon, por ke ĉiu esprimu sin detale pri ĝiaj punktoj. Do ideointerŝanĝoj riĉigis nin ĉiujn. Plie ni povis akcepti novan membron de la estraro elektita en Oostende, Elena NADIKOVA, vic-direktorinon de lernejo en Ĉeboksari, Ruslando. Ni malkovris ŝin, ŝi malkovris nin, la Ligon, ĝiajn taskojn. Ŝi apartenas al la redakta skipo de nia revuo *Juna Amiko* jam de jaroj. Fine de sia feriado en Svislando ŝi verkos la oficialan protokolon de ĉi

tiu estrarkunsido. Ni tre bedaŭris, ke alia nova membro, Emile MALANDA NIANGA, ne povis veni al Svislando pro la severaj reguloj de tiu lando pri alveno de afrikanoj. Tre ĝoja momento okazis kun Emile en Kaburbo per skajpo, dum kiu ankaŭ fora brazila nova membro Ivan COLLING ĉeestis. Kvinope ni povis diskuti abunde. Per skajpo okazis alia kunsido sesopa, kun ni tri kaj Ivan en Brazilo, nia vic-prezidantino Arko en Ĉinio kaj nia kasisto Vilĉjo en Kalifornio. Grava temo de niaj diskutoj estis la ĉi-jara Konferenco, la 49-a, kiu okazos en Hungario. Ĝia enhavo devas esti zorgeme preparita; jen la tasko de Radojica PETROVIĆ, kiu havas longjaran sperton pri tio. La partopreno de Stefan MACGILL ebligis, ke ni skizu la eblojn por la venontaj jaroj. UEA havu prioritaton por fiksi la lokon de UK; ILEI esploru pri najbara loko, ĉar la eblaj partoprenontoj estas la samaj. Ambaŭ eventoj eble okazos en Afriko, neniŭ decido pri tio ĝis nun... Por nia ĉi-jara Konferenco laŭ propono de unu el niaj membroj okazos konkurso dediĉita al orient-eŭropanoj por ebligi al ili partopreni en la Konferenco kun kontribuo de ILEI por vojaĝkostoj. Preciza regularo aperos baldaŭ. Instruista trejnado centras ĉe ILEI. Ĝi aperos en la Konferenco, prelegoj koncernos la ĉiutagan laboron de instruistoj.

En septembro 2016 startos la unujara lertigado de instruistoj en Poznano, Pollando. Kun hejmtaskoj, ekzamenoj, provlecioj kaj... diplomo!



Ĉe la limo sur ponto de la rivero Doubs

Alia eblo estos prezentata okaze de nia Konferenco. Tiel iom post iom la ebloj kreskas, cele al plibonigo de la situacio. Pri lingvokapabloj aperas diversaj diplomoj tra la mondo. La estraro de ILEI diskutis pri adekvata sinteno al tiu situacio. La gvidlinioj pri nia organo *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) preciziĝis. La revuo devas esti riĉiga por niaj membroj, kaj ankaŭ prestiĝa por esti nia vektoro al la ekstera faka mondo.

La *Jaro de la Lernanto* (JdL) komenciĝos en julio okaze de la UK. Jen evento, kiu postulas de ILEI, de ĝia estraro, de ĝiaj sekcioj kaj membroj, ideojn, proponojn, pripensojn. Tio jam aperis en IPR 2016 1 kaj venos kaj venados cele al bunta programo dum plena jaro. ILEI estos la fokuso de la tuta movado. La Ligo devos aperi digne kaj efike. Temas pri granda defio por ni ĉiuj. Nia efika laboro devos iri al la ekstera mondo per taŭga informado. La *Jaro* estis detale preparita en la pasintaj tagoj en Les Brenets.

Decidita estas propono al la Komitato pri kreo de laborgrupo por prepari statutŝanĝojn. Pri tio decidis la Komitato en aŭgusto. Pozitiva novaĵo estas la relanĉo de la projekto *Interkulturo* danke al iniciato de universitato en Brazilo, kie junuloj lernas Esperanton por ekrikti kun alikulturaj junuloj.

La aktivigo de niaj laborkomisionoj, la enhavo de nia „juvelo” *Juna Amiko*, la kunlaboro kun helpemaj membroj, la eldonado de prelegaroj, la prizorgado de nia retejo, la kvara eldono de la *Manlibro pri Instruado de Esperanto* estis pliaj temoj de nia fruktodona kunsido.

Mireille GROSJEAN
Prezidanto de ILEI

Oni Ekparolis ĉe edukado.net

de Katalin KOVÁTS (Nederlando/Hungario)



En la antaŭa numero de IPR (2016/1-p.13) ni jam raportis pri la tiam lanĉota nova projekto de edukado.net.

Nun ni kun ĝojo diskonigas la informon, ke *Ekparolu!* jes ja ekis. En la komenco de majo 2016 la unuaj genevoj (novlernintoj de E-o), subtenataj de geonkloj (spertaj esperantistoj),

povis komenci sian ekzercadon pri parolado.

Kvankam la definitiva komputila surfaco ankoraŭ ne ekzistas, helpe de la jam funkciantaj programmoduloj kaj multe da mana administrado, Katalin KOVÁTS eksperimentcele ekfunkciigis la projekton, por akiri spertojn por la konstruota programo kaj enketi pri la laborfortoj de la geonkloj kaj interesiĝo de la genevoj.

En la unua etapo estis trejnitaj 21 geonkloj. Ili estas spertaj esperantistoj, pluraj el ili konataj movaduloj kun multaj instruspertoj, aliaj malpli famaj, sed entuziasmaj. Ĉiu el ili volonte konversacios kun la genevoj.

La geonkloj venas el 11 landoj: Francio (6), Danio (2), Germanio (2), Rusio (2), Usono (2), Svislando (2), Argentino (1), Brazilo (1), Hispanio (1), Finnlando (1), Slovakio (1). La 10 genevoj devenas el Francio (3), Turkio (2) kaj po unu el Britio, Italio, Rusio, Svislando kaj Usono.



Por singarde testi la sistemon kaj lasi tempon al la geonkloj al kutimiĝi al la tasko, ni akceptis komence nur 10 genevojn, kiuj devis trapasi ekzamenon pri vortostoko, bazaj gramatikaĵoj kaj noti diktaĵojn, prezentatajn de John WELLS. Ni ne akceptas personon, kies Esperanto-kono estas sub la nivelo A2, ĉar ni opinias, ke por vere konversacii oni unue devas lerni la bazojn. Post la sukcesaj enirtestoj de la genevoj la redaktoro ekhavis kun ili la unuan konversacion, kiu estis ĉefe orientado en la paĝaro kaj prezento de la sistemo. Post tia enkonduko la genevoj povis ekkoni la liston de la geonkloj kaj la agendon, kaj povis elekti siajn unuajn sesiojn de konversacioj. Observeblas

ke – kvankam la semajna agendo estas preskaŭ plena je elekteblaj 30-minutaj sesioj – la genevoj zorge elektas siajn geonklojn kaj semajne uzas nur 1-2 lecionojn. La duono el ili estas vere freŝbakitaj, la aliaj jam de pluraj jaroj lernas Esperanton, sed tute izolite kaj neniam parolis la lingvon. Do la eblo konversacii kun personoj metodike trejnitaj, estas granda kuraĝigo por ili. Edukado.net speciale proponis tiun eblon ankaŭ por la kandidatoj de la KER-ekzamenoj, el kiuj kelkaj profitis el la okazo. Tio tamen estas alia sperto ol babili rete kun hazarde trafitaj nekonatuloj.

La paĝaro kaj por la geonkloj kaj por la genevoj disponigas tem- kaj vortolistojn, kaj la redaktoro, baze de la observoj kaj konsiloj de la geonkloj, proponas ekzercojn por la genevoj.

En la nuna fazo de la projekto ĉiu nevo kaj nevino ricevas 10 sesiojn, kaj post difinitaj periodoj iliaj plej ŝatataj onkloj aŭ onklinoj rekontaktos la genevojn por konversacio. Aldona servo estas, ke ni korektos por ĉiu nevo/nevino du tekstojn, kiujn ili povos alŝuti al sia studparto en la retejo kaj kiujn ili ricevos korektitaj kune kun konsiloj. Post la kunstudado la genevoj povas utiligi niajn konsilojn pri la pluaj studebloj, ekzercoj, libroj, kaj se ili deziras resti en nia sistemo, ili regule ricevos novaĵleterojn pri aranĝoj, ekzamenoj, lerniloj ktp.

Jam nun videblas, ke kelkaj nevoj rapide fariĝos onkloj, do, ili restos en nia projekto, sed baldaŭ ĉe la alia flanko de la mikrofono.

Dum la someraj aranĝoj kiel Kleriga Lundo dum UK, Itala Kongreso, metodikaj trejnkursoj en Poznano, Kvinpetalo kaj Le Touquet okazos pliaj ĉeestaj trejnadoj.

La programan surfacon edukado.net ekkonstruigos en septembro, kondiĉe ke ĝis tiam estos pli ol 100 geonkloj trejnitaj kaj la laborforto estas garantiata por la akcepto de plurcent, eventuale mil genevoj. Ni esperas ke ĉio funkcios fine de 2016.

Kiel vi povas helpi, partopreni? Anoncu vin se vi deziras fariĝi onklo aŭ onklino aŭ kontaktigu kun ni komencinton, kiu bezonus helpon en la parolado.

Por la konstruigo de bone kaj plejparte aŭtomate funkcia administra programo ni bonvenigas monhelpon (vd. edukado.net/prie/subteno).

DEK JAROJ EN ESPERANTO-LANDO

Luiza verkis eseon, rando de kiu Mirejo komentas kaj faras demandojn, kiujn Luiza respondas.

Unua parto: ĈU MI ATINGIS LA DEKOMENCAN CELON?

Luiza: La 11-an de aprilo 2005 mi premis la komputilan butonon por aliĝi al la programo „lernu!” (www.lernu.net). Hodiaŭ, post 10 jaroj de esperantista vivo, mi provas rememori pri miaj tiamaj atendoj kaj supozoj, por kompari ilin kun miaj nunaj maturaj opinioj rilate la socian fenomenon nomatan Esperanto.



Mi decidis eklerni la lingvon, post kiam mi legis brilan eseon de Claude PIRON, titolitan „*Psychological Reactions to Esperanto*” (Psikologiaj reagoj al E-o).

Mi estis tiam 58-jaraĝa. Min ne aparte interesis la E-e parolanta komunumo mem, ĉar mi opiniis, ke lingvo tute ne estas kriterio, laŭ kiu indas ekamikiĝi. Mi jam scipovis kvar etnajn lingvojn, tial mi tute ne sentis mankon de „pontolingvo” por ekamikiĝi aŭ por legi. Kion mi scivolegis ekkoni estis la E-a kulturo, kies ekzisto perpleksigis min. Precipe la originalan E-an literaturon mi deziris malkovri rekte, sen la pero de etnalingva traduko. Tiam mi rezonis, ke lingvo ne kapablas formi homajn karakterojn, tial la esperantista komunumo ne povos ŝajni al mi tro malsimila al ajna alia lingva komunumo, kiun mi jam konis. Evidentiĝas, ke mi malpravis. Mi kredas, ke lingvolernado mem ne formas personecojn.

Mirejo: Kara Luiza! Mi tendencus opinii, male al vi, ke malkovro de lingvo, de ties strukturo, de ties sintakso, lasas spurojn en la menso de la lernanto. Akiro de konoj pri alia kulturo riĉigas la lernanton kaj ebligas al li/ŝi ĵeti novan rigardon al siaj propraj lingvo kaj kulturo. „*Wer keine fremden Sprachen kennt, weiss nichts von seiner eigenen.*” skribis Goethe, fama germana sciencisto, filozofo kaj verkisto. (Tiu, kiu scipovas nenium fremdan lingvon, scias nenion pri sia propra). Plie lernante E-on, iu eniras en pensmanieron tutmondan: mi estas membro de la homa familio! Kara Luiza! Ĉu vi povas akcepti tion?



Luiza: Mi konsentas pri tio, ke lernado de ajna lingvo lasas spurojn en la menso de la lernanto kaj verŝajne influas pozitive la kapablojn de ties cerbo. Mi konsentas kaj ĝisoste konsentas, ke akiro de konoj pri alia kulturo riĉigas la mensojn kaj la animojn. Jes, mi renkontis homojn rifuzantajn lerni aliajn lingvojn krom la denaska, kaj mi ĉiam konstatis, ke ĝuste tiuj malbone uzas la denaskan lingvon. Mi konis homojn, kiuj rifuzis dediĉi sian energion por konatiĝi kun alia kulturo krom la denaska, supozante ke tiamaniere ili restos pli „fidelaj” al sia denaska kulturo; sed en ĉiuj tiaj kazoj, mi havis la fortan senton, ke ilia aliro al sia denaska kulturo restas nur supraĵa. Pri unu sola afero mi havas malsimilan sintenon: mi ne konsideras la vortojn „lingvo” kaj „kulturo” sinonimoj, kvankam inter lingvo kaj kulturo ekzistas grandega interdependo. Oni ofte aŭdas la metaforon: „lingvolernado estas fenestro al la ekstera mondo.” Tiu metaforo ja ŝajnas al mi taŭga, sed oni ne konfuzu la fenestron kun la ekstera mondo. Mi kredas, ke ne la fenestro kontribuas al la formado de nia personeco, sed tiu fragmento el la ekstera mondo, kun kiu ni konatiĝas pere de la fenestro. Ni mem selektas tion, kion ni deziras esplori pere de la lingvo kaj kiel interpreti la rezultojn de niaj esploroj. Kiel lingvo-instruistoj, ni helpas la lernantojn akiri mirindan „fenestron”, kaj ankaŭ prezentas al ili kelkajn vidindaĵojn tra la „fenestro”.



Al mi ŝajnas, ke en la procezo de formado de mia personeco, la konatiĝo kun diversaj kulturoj ne estis vere dependa de lingvolernado. Tial mi inklinas kredi, ke lingvolernado ne kontribuis per si mem al la formado de mia personeco. Mi tuj klarigas kial.

Ĝis nun, mi lernis je pli-malpli flua nivelo 4 ne-denaskajn lingvojn: la francan, la anglan, la hebrean kaj E-on. (Mi evitis ĉi-supre la vorton „fremda”, ĉar lingvon, kiun mi jam uzas – eĉ malperfekte – buŝe kaj skribe, mi ne plu konsideras „fremda”.) La lernado de tiuj 4 lingvoj ja faciligis por mi alirojn al diversaj kulturoj, kiuj kontribuis kaj kontribuas al la formado de mia personeco. Malgraŭ tio mi sentas, ke la ne-denaska kulturo, kiu plej gravas por mia vivo estas, la joga tradicio pri meditado kaj fizikaj ekzercoj, kvankam mi konatiĝis kun tiu fascina aspekto de la hinda kulturo nur pere de tradukoj. Verkistoj kiel HOMERO, Hans

Christian ANDERSEN, Miguel de CERVANTES k.a. forte influis miajn animon kaj menson nur pere de tradukoj. Cetere mi sentas, ke eĉ pli grava ol kulturo mem estas la maniero laŭ kiu oni interpretas ĝin. Miguel de CERVANTES kaj la fanatikaj Grandaj Inkvizitoroj de Hispanio parolis la saman lingvon kaj kreskis ene de la sama etna kulturo... sed kiom malsimilaj personecoj! Rilate la interpretadon de kulturaj tradicioj, oni povas diri, ke la maniero, laŭ kiu oni prezentas al la infanoj ties etnan kulturon kaj ankaŭ aliajn kulturojn estas ege grava. Nun, kara Mirejo, mi rememoras vian bonegan prelegon pri porpaca edukado, kiun mi ĉeestis en la aŭtuno de 2009 en Svislando. Revenante hejmen, mi ofte pensis pri viaj ekzemploj kaj meditis pri la fakto ke, pere de la sama lingvo, oni povas eduki infanojn kun la intenco formi ontajn honestajn civitanojn, aŭ kun la intenco formi ontajn fanatikajn monstrojn... Tio pruvas, ke homaj personecoj havas gravegan rolon en la formado de aliaj personecoj kaj de siaj propraj. Tiu tutviva procezo okazas plej ofte senkonscie, pere de lingvoj aŭ/kaj pere de aliaj „fenestroj”: muziko, danco, vidartoj k.a.

Kaj nun mi atingas la plej tiklan parton de la problemo. Kion diri pri tiuj kazoj, kiam du ĝemelaj fratoj akiras tute malsimilajn personecojn, kvankam ili kreskis samtempe en la sama familio, parolis la saman lingvon kaj estis edukitaj en la sama kulturo fare de la samaj instruistoj...? Mi mem ne havis gefratojn, sed hazarde mi bone konis bedaŭrindan, eĉ tragedian kazon, kiam du fratinoj akiris tute kontraŭajn personecojn, kaj tio kondukis al dumvivaj terure dolorigaj konfliktoj. Fakte mi kredas, ke formado de homa personeco estas unu el la grandaj mirakloj de la mondo, kies misterojn oni ankoraŭ ne konas ĝisfunde...

Laŭ mi, ĉiuj el ni estas parto de la tuta mondo ekde nia naskiĝo. E-o helpas nin konsciiĝi pri tiu ĉi aparteno, ĉar E-o estas eksterordinare bona ilo por komunikado inter etnoj. Sed se ni utiligos tiun ilon por ofendi kaj malhelpi unuj la aliajn, nenion pozitivan ni povos atingi, eĉ regante perfekte la pronomon „si” kaj la verbajn participojn. Mi kredas, ke indas uzi konscie kaj saĝe tiun mirindan „fenestron” al ĉiuj kulturoj de la mondo, por plibonigi niajn proprajn vivojn kaj la socian ĉirkaŭaĵon.

Luiza: ...Sed ĉiuj aliaj lingvaj komunumoj ne vere elektas sian lingvo-lernadon... Etnajn lingvojn oni lernas ĉu denaske (pere de tiu mistera lingva instinkto, kiun ni ĉiuj konas sed ne kapablas ĝisfunde kompreni), ĉu laŭ-bezone (kiam iun etnan lingvon oni altrudas al ni en la lernejo, kiam la ondoj de la vivo igas nin enmigri en alian landon, kiam iu etna lingvo estas necesa

por nia kariero, kiam iu etna lingvo estas la denaska lingvo de persono, kun kiu ni deziras edziĝi aŭ edziniĝi ktp.). Malsimile al tio, E-on estas ni mem kiuj elektas, krom kelkaj tre raraj esceptoj, kiam infanoj akiras ĝin en e-istaj familioj. La plenkreskaj personoj, kiuj decidas eklerni ĝuste tiun lingvon, havas tre diversajn kialojn por fari tion, tamen kutime kundividigas kelkajn gravajn ĝeneralajn trajtojn. Per la lingvolernado mem ne formiĝas apartaj homaj personecoj, sed kutime E-on elektas plenkreskuloj, kiuj jam havas apartajn homajn personecojn antaŭ ol ili esperantistiĝas. Ni ofte konsideras unuj la aliajn „strangulojn”, sed preskaŭ neniam konsideras unuj la aliajn obeemaj, imitemaj, pretaj sekvi modojn, kliŝojn kaj konvenciojn senpripense ŝafmaniere. Nia plej grava komuna trajto ŝajnas al mi la deziro interkomunikiĝi, por ekkoni aliajn tradiciojn, aliajn kulturojn. La plej evidentaj ecoj, kiuj plej ofte difinas la personecojn de miaj nunaj e-istaj geamikoj, estas scivolemo, eksperimentemo, malfermiteco fronte de novaj ideoj, respekto por la tradicioj de aliaj etnoj, deziro lerni por larĝigi sian horizonton, optimisma fido je la homa kapablo plibonigi sian propran karakteron kaj helpi al la plibonigo de la tuta socia vivo...

Mirejo: *Kara Luiza! Ĉi tie mi tute samopinias kiel vi. Kiam mi restadis en Japanio, mi demandis al miaj amikoj tie: Ĉu vi estas „normalaj” japanoj? Verŝajne ne, ĉar tiuj japanaj esperantistoj estas, kiel vi tute prave priskribas, scivolemaj, malfermitaj. El tio ni povus dedukti, ke ni akiras ne precizajn ideojn pri iu popolo per kontakto kun esperantistoj el tiu popolo. Kion vi opinias pri tio?*

Luiza: *Mi estas judino. Mi ne scias, kion signifus tipa judo, se entute tia kuriozaĵo ekzistus. Por malkovri tion, kion signifus tipa judo, oni devus prepari ampleksan statistikon baze de longa demandaro, al kiu respondus judoj el preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo kaj apartenantaj al tre malsimilaj tradicioj eĉ ene de la sama lando... Ĝis oni finus tian grandiozan esploron, pasus minimume jardeko kaj la tuta materialo jam eksdatiĝus. Eĉ se eblus trovi en la tuta mondo unu strangan kreitaĵon, kies trajtoj kongruus kun tio, kion oni konsiderus la tipa judo... tiu kreitaĵo ne interesus min. Mi ne deziras simili iun ŝablonon kaj ankaŭ ne deziras malsimili ĝin. Sekve de tio, al mi indiferas ankaŭ la etna tipeco aŭ multipeco de miaj konatuloj. Cetere, laŭ mia sperto, tre ofte la ĝeneralaj ideoj pri etna tipeco koncerne homajn personecojn estas malnovaj antaŭjuĝoj, ofte jam tute maltaŭgaj niatempo, kelkfoje eĉ ofendaj. Precipe ĉi lastajn mi ne ŝatas disvastigi, ĉar laŭ mi la antaŭjuĝoj malutilas al la plibonigo de interhomaj rilatoj.*

Mirejo: *Kara Luiza! Vi tute pravas, ke stereotipoj estas danĝeraj bestoj... Male, ĉiu individuo estas unika kaj koninda.*

Luiza: ...Ĉiujn ĉi ecojn mi trovas kaj ŝatas ankaŭ ĉe miaj ne-esperantistaj amikoj, sed mi sentas, ke en la E-e parolanta komunumo ili aperas proporcie pli ofte ol en aliaj medioj. Tial mi amas la e-istan komunumon kaj prifieras aparteni al ĝi. Sen tiu sento, mia scivolo pri la internacia lingvo verŝajne estintus elĉerpiĝinta post nur kelkaj monatoj de lernado, kaj mia intereso pri la E-a kulturo verŝajne estintus vaporiĝinta eĉ antaŭ ol mi kapablis gustumi ĝin... La etnaj lingvoj kaj kulturoj estas pli-malpli spontanaj sociaj fenomenoj, dum E-o ekzistas kiel konscia socia fenomeno. Ĝuste tial ĝi havas i.a. la gravan rolon konsciigi al ni kio estas lingvo kaj kio estas kulturo. Alivorte, ĝi pensigas nin pri tio kio estas homo. Mia dekomenca celo iom post iom ŝanĝiĝis: mi ekdeziris fariĝi parto de la Esperante parolanta komunumo kaj kontribui al ĝia kulturo.

Mirejo: *Kara Luiza! Jes ja, vi kontribuas al ties kulturo, eĉ brile! Vi verkas por ni pri lernado de Esperanto, vi verkas belajn rakontojn por nia revuo „Juna Amiko” kaj vi korektas „Internacian Pedagogian Revuon” atenteme. Ricevu nian elkoran dankon!*

Luiza: *Dankon pro via aprezo.*

Pliaj partoj aperos en sekvontaj numeroj de IPR.

Estu ni diligentaj lernantoj

de Lida ELBAKJAN, Re prezentanto de ILEI en Armenio

De juneco mi ĉiam ŝatis instrui kaj pensis nepre esplori diversajn metodojn de instruado. Komence mi finis specialan pedagogian lernejon, kiu multe donis al mi en tiu sfero. Kaj mi plu frekventis la Erevanan Ŝtatan Universitaton, post kio mi estis sendita en vilaĝon por instrui geografion en ruslingva lernejo. En ĝi estis lernantoj el ses nacioj, havantaj siajn specifajn kulturojn, kaj mi, estante sufiĉe juna kaj malsperta, komencis esploron de instruado al tiu multnacia kontingento.

Jen pasis tempo, mi esperantistiĝis. Mi sukcesis ricevi diplomon de Esperanto-instruistino en Internacia lernejo en Pisanica (Bulgario). Duan sperton de instruado mi ricevis en la sama Pisanica, kiam mi praktikis antaŭ klaso konsistanta el anoj de dekkvin nacioj.



En 1990 mi estis feliĉa partopreni lernadon de akupunkturo en urbo Pekino (Ĉinio). Nia ĉina profesoro diktis frazon, ni ĉiuj (armenoj, polo, litovo, belgoj) diligente skribis ĝin. Kaj poste la profesoro petis nin, ke ĉiu, po vice, laŭtleĝu la frazon. Dum tuta leciono ni faris la samon, ripetadis frazon tiom foje, kiom da lernantoj ĉeestis la lecionon. Unu el la armenoj komencis malkontenti pro tede. Tamen la aliaj, komprenante la metodon de lernado en Ĉinio, decidis fariĝi ĉino (nur dum lernado en Ĉinio) kaj provis memorfiksi la lecionon tiamaniere.

Do, kiom da nacioj, tiom da kutimoj kaj tradicioj.

Plu verkas M. GROSJEAN pri la sama temo: Ripetado

En la lingvolaboratorioj de la sepdekaj jaroj la studentoj daŭre devis ripeti. Ĉiu ekzerco havis la saman strukturon: unue venis frazo dirata de la instruisto. Due venis la transformita frazo dirata de la studento, frazo ĝusta aŭ malĝusta. Trie venis la ĝusta frazo dirata de la instruisto. Kvare venis la devo por la lernanto RIPETI la ĝustan frazon ĵus diritan de la instruisto. Vidu la skemon. Kompreneble venis unue unu aŭ du ekzemploj, tiel ke la lernanto malkovru la farendan taskon, la farendan modifon. La avantaĝo de tiu metodo estis, ke ĉiu lernanto havis registrilon kun sonbendo kaj povis reaŭdi la frazon, la ekzercon, ĉiam denove, kaze de bezono. Laŭ la decido de la lernanto.

INSTRUISTO

XXXXXXXXXX

YYYYYYYYYYYYYY

LERNANTO

YYYYYYYYYYYYYY

YYYYYYYYYYYYYY

En mia praktiko mi ofte observis jenon. Mi klarigis ekzemple: „La pluralo de la vorto *le bijou* estas *les bijoux*”. Iu lernanto levis la manon kaj demandis:

„Do la pluralo de la vorto *le bijou* estas *les bijoux*, ĉu ne?” Mi diris: „JES!”. La lernanto kaptis mian diron, maĉis ĝin, kaj sentis la bezonon havi konfirmon de mi pri sia malkovro. Poste li/ŝi montris grandan kontentiĝon. Do li/ŝi levis la manon kaj okupis iom da tempo en la leciono. Mi devis atentigi ĉiujn lernantojn, ke, kvankam mi bonege komprenas tian bezonon, mi ne povus akcepti, ke 25 lernantoj unu post la alia, postulus tian rektan personan konfirmon de mi! Ne eblus pro troa tempouzo. Ĉu tempoperdo? Jen la demando....

Kion ni lernu el tiuj faktoj?

Ripetado signifas, ke la lernanto parolas, do aktivigas sian korpon, siajn parolorganojn, enspiras kaj elspiras. Li/ŝi vekiĝas, kaze ke li/ŝi dormis en teda kurso.... Ripetado signifas, ke la dirita frazo fiksiĝas en lia/ŝia menso, memoro. Fama estas la konstato: mi aŭdas – mi forgesas. Mi diras – mi memoras. Mi agadas – mi komprenas. Do ripetado estas pli efika agado ol nur aŭdi, aŭskulti pasive. Alia aspekto estas, ĉu la lernanto parolu sola, kiel solisto en koncerto, aŭ korse? Ni ne forgesu, ke por kelkaj lernantoj estas tre ĝene paroli solaj (ĉiuj povas aŭdi kaj taksu liajn/ŝiajn diraĵojn), bona solvo estas paroligi la tutan klason korse. Kaj kial ne kanti?? La lasta aspekto estas tiu konfirmo. Tio estas tre bona maniero: la lernanto malkovras ian aspekton de la lernobjekto kaj mem klarigas laŭ sia kompreno, per siaj vortoj. La instruisto sekvas sen interrompi, silente, tre atenteme. En la momento, kiam la lernanto atingas la finon, la instruisto gratulas. Aŭ: en la momento, kiam la lernanto devojiĝas el la ĝusta dedukto-klarigo, la instruisto intervenas klarigante la revenon al la ĝusta vojo. Kompreneble tia lernstrategio povas okazi nur en dupersona kunsido. Grava aspekto de tiu strategio estas, ke la lernanto klarigas per siaj vortoj; nuntempe ni povas observi en diversaj mondopartoj, ke la junuloj evoluigas ian slangon, kiu povas esti sufiĉe malsama kompare kun la altnivela lingvaĵo de la instruisto. Feliĉe ili ankoraŭ interkompreniĝas! Sed en tia situacio la lernanto elektas la vortojn kaj tio estas granda helpo al li, al ŝi, por atingi komprenon de la lernenda afero. Alia grava aspekto estas, ke ĉiu havas siajn vojojn en sia cerbo; povas okazi, ke la encerba reto de la lernanto ne komplete similas al tiu de la instruisto. Kutime la lernanto sekvas laŭ la vojo de la instruisto; laŭ tiu metodo la instruisto devas sekvi la vojojn de la pripenso de la lernanto. La instruisto havas la taskon sekvi, akompani, kontroli, kaj interveni per fina aprobo aŭ korekto.

Mia instruisto LI Shijun (Laŭlum)

de YU Jianchao (Ĉinio)



La nomo LI Shijun estas probable nekonata, sed vi nepre scias la nomon Laŭlum. Jes, Laŭlum ja estas LI Shijun, mia instruisto de Esperanto.

„Esperante Grandegulo li estis. Ni titolas lin kiel grandegulon, indikante, ke li de juneco ĝis la aĝo de 90 jaroj edukis sen-nombrajn junulojn, kaj indikante, ke malgraŭ sia maljuneco li viglis en diversaj

lokoj de la lando por partopreni en Esperantaj agadoj....”

Tion diris NAN Youli, prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio, en la kunveno memore al Laŭlum en la jaro 2012. En sia parolo, NAN Youli nomas Laŭlum „Grandegulo” kaj poezie reliefigis la meritoplenan figuron en Esperantujo.

Laŭlum (1923 – 2012) estis ĉefredaktoro de EPCĉ, membro de Esperanta Akademio, honora membro de ILEI, kaj, plej grave, instruisto de Esperanto.

Mi la unuan fojon vidis Laŭlum en mia hejmloko Qingdao, en la jaro 1987. Tiam ni faris la ĉinan unuan televidan kurson de Esperanto. Majstro LI Shijun kompilis la lernolibron *Espero* por nia televid-serio. Sed mi vere konatiĝis kun li en la jaro 1989, kiam funkciis la Esperanto-kurso en la fremdlingva fakultato de Pekina Disaŭdiga Instituto (nun Ĉina Komunikada Universitato).

Feliĉe mi havis la ŝancon tie lerni E-on sub la instruado de Laŭlum. Tiam li loĝis en la instituto, kaj tutenergie laboris por kulturi la junajn gelernantojn. Sed la junuloj tute ne komprenis lin, ĉar li estis tiom diligenta kaj instruema. „Kiam mi unuafoje renkontiĝis kun Laŭlum, li estis jam 66-jara. Laŭ mia kompreno, homo en tia aĝo kun tioma merito, povus fari nenion krom ĝui la vivon, ĝui la respekton de aliaj. Tamen li ekinstruis Esperantan kurson en Pekina Disaŭdiga Instituto, eĉ loĝis en la lernejo!” YU Tao, unu el miaj kunlernantoj, kiu iam fariĝis estrarano de UEA, rememoris la meriton de Laŭlum, kaj opiniis, ke Laŭlum estas idealisto, kaj dediĉis sin al la idealo disvastigi E-on.

Esperantujo scias, ke Laŭlum dumvive laboris per E-o kaj por E-o, lia sukcesa atingo kulminas en lia tradukado de tri el la kvar ĉinaj klasikaĵoj. Li kompilis multe da lernolibroj krom la kursoj por televida serio. Li kompilis vortarojn, kaj la lasta vortaro estas miniformata Esperanta Vortaro por Infanoj farita kune kun la filo, LI Chaoyang, kiu vivis ĉiam ĉe la patro.

Laŭ LI Chaoyang, lia patro kiu estis grandegulo en la Esperanta movado, ŝajnis ordinara kaj modesta en la ĉiutaga vivo: knabece li interesiĝis pri ĉio kaj diligente studis, junece li jam posedis la kvaliton de tradukisto kaj eklaboris profesie por E-o, kaj maljunece li atingis tiom brilan sukceson kaj en sia profesio kaj en la E-movado, ke la registaro distingis lin per *Dumviva Honora Premio pri Tradukado*. Dume li neniam forgesis, ke li estas edzo kaj patro, kiu portas la devon zorgi malsanan edzinon kaj petolemajn gefilojn.

Laŭlum parolante pri si mem konsideris, ke li dum la tuta vivo faris nur unu aferon, tio estas E-o. Ivanka STOYANOVA (Aminda), bulgara esperantistino, kiu iam laboris ĉe EPĈ, skribis en sia blogo: „Li diris al mi, ke dum sia tuta vivo li nur laboris per kaj por E-o.” Oni havas grandan dankemon kaj respekton al li. Li per siaj diligenteco kaj abundo da tradukoj en E-on, verkado kaj instruado, starigis monumenton por la ĉina Esperanto-Movado.

En la jaro 1989, kiam mi studis Esperanton sub la instruado de LI Shijun en dujara kurso kun 12 lernantoj, laborantaj por la Radio kaj EPĈ/ĈEL, la majstro LI Shijun jam emeritiĝis el sia posteno.

Post 15 jaroj, en la jaro 2003, Pekina Disaŭdiga Instituto refoje funkciigis Esperanto-kurson samdestine. Oni ne plu invitis instruiston pli-ol-70-jaraĝan. Mi, tiama estrino de E-Redakcio de ĈRI, invitis sinjoron LI Weilun prizorgi la instruadon, kaj tiu saĝa sinjoro LI Weilun petis helpon de LI Shijun, ke tiu instruu pri la Esperanta literaturo kaj tradukado. Nun elstaras el tiu kurso ĉe nia Radio Shanshan, Lina, Diamanto kaj Pluveta kaj ĉe EPĈ kaj ĈEL LI Jianhua kaj SHI Guang. La tiama kursoĉefo LI Jianhua tiel skizis sian lernadon sub la instruado de LI Shijun:

„Kiam mi lernis E-on en la Ĉina Komunikada Universitato de 2003 ĝis 2005, Laŭlum estis unu el miaj instruistoj. Laŭ mi, kvankam li jam estis pli-ol-80-jara, li ĉiam estis plena de energio. Li ĉiam kreis E-an etoson en la klasĉambro. Li speciale kompilis lernolibrojn por ni. Mi tre ŝatas tion, precipe tiun pri famaj esperantistoj, nome la kursaro de Esperanta Literaturo.”

Tiom pli, en la jaro 2006, kiam Ĉina Komunikada Universitato (Antaŭa Pekina Disaŭdiga Instituto) varbis 12 studentojn por la kvarjara kurso de

Esperanto, mi (iama lernanto de LI Shijun) fariĝis unu el la instruistoj. Por la lecionaro pri tradukado, mi petis helpon de LI Shijun, kiun, pli ol 80-jara, oni ne plu ĝenis por la instruado. La afabla majstro malavare donis al mi la memkompilitan instruolibron: *Arto de Tradukado*, kaj li diris al mi, ke li donis ankaŭ al alia instruisto sian preparaĵon por la lernolibro kompilita de William AULD: *Paŝoj al Plena Posedo*. Mi povas diri, ke eĉ studentoj kiuj ne ricevis la instruon rekte de Laŭlum, ja profitis el lia favoro, kiun mi kontente ricevis persone.

Do mi diru, ke Laŭlum kulturis la junajn esperantistojn en la sama universitato intertempe en tri periodaj kursoj. Mi spertis lian instruemon kaj amon al la junuloj. Plie mi diru, ke li meritas la honoron fariĝi dumviva membro de ILEI, kion oni deklaris en la 45-a Konferenco de ILEI en Kunming, 2012, kiam mi sidis inter la aplaŭdantaj komitatanoj. Tiu lasta honoro en lia vivo probable resumas lian sukceson en Esperanta edukado, sed ne povas ampleksi lian tutan atingon kiel esperantisto, kiu vivis nur por Esperanto. TAN Xiuzhu, eksa direktorino de EPĈ, taksis lin: „Mi foje supozas, ke li venis al nia mondo ĝuste por Esperanto, kaj vivis kaj laboris por ĝi ĝis la lasta spiro.”

Ĉu vere ekzistas tia homo, kiu vivas nur por E-o? El la intervjuo kun bulgara amikino Aminda, mi kvazaŭ eltrovis la respondon, ke li ja estas tia pura homo.

Fakte, mi estas la lasta, kiu vizitis Laŭlum vivantan. Tio okazis tri tagojn antaŭ lia forpaso, la 7an de novembro, 2012, lunkalendara festtago: Vintrokomenco. Mi menciis la viziton en mia blogo, en kiu tekstas: „Studentoj kiel ni antaŭ pli ol 20 jaroj, ofte plendis pri lia babilemo, sed nun mi forte deziras multe babili kun li kaj parkere memori ĉiun vorton el lia parolo. Parolante pri sia instruado en Pekina Disaŭdiga Instituto, li unuafoje malkaŝis sian maltrankviliĝon, ke li ne meritus je instruado al studentoj, ĉar li mem eĉ ne havis diplomon de ia ajn alta lernejo. Mi diris al li, ke, kiam mi parolis kun eksterlandaj amikoj pri Laŭlum, ĉiu sciis la nomon, se mi diras, ke mi estas studento de Laŭlum, ĉiu ĵetis al mi rigardon de admiro. Mi scias, ke la admiran rigardon donis ili ne al mi sed al nia kara instruisto Laŭlum. Aŭdintion, li tenere mienis kaj ridetis.”

Mi deziras, ke la rakonto forviŝu lian maltrankviliĝon en la koro. Sed mi bedaŭras ne registri lian voĉon dum la lasta vizito. Bedaŭras tion ankaŭ mia amiko Imre SZABÓ, prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio en la jaro 2012, kiu vere ĵetis rigardon de admiro al la studentino de Laŭlum, kiam ni promenis en hungara ŝtata tombejo, omaĝante antaŭ la tombo de Julio

BAGHY. Tiun jarfinon, kiam SZABÓ informiĝis pri la forpaso de Laŭlum, li bedaŭris pri tio, ke Esperantujo perdis la meritulon kun sonora nomo: „Ĉinaj nomoj por ni estas malfacile memori, sed Laŭlum estas tre bone konata al mi. Mi legis liajn verkojn. Mi pensis, ke li forpasis tro frue, ĉar mi ne povas vidi lin vivanta.”

Mi esperas, ke li, Laŭlum, aŭskultinte la takson de Esperantujo, dormas en la alia mondo sen ia ajn maltrankvilo. Iu erudiciulo, neesperantista, kiu havis laboran kontakton kun Laŭlum, skribis jenajn versojn por karmemoro:

*Senmortas lia mieno kaj la voĉo laŭ lumo
Flamas la spirito kaj la heredaĵo de la majstro
Sinbanas la posteuloj en la brila lumo
Diligentas la junuloj por la Esperanta afero.
Marŝas la verduloj en la nova epoko sub la prilumo.*

Nelaste, mi deziras mencii, ke antaŭ sia forpaso li donis al mi la poemaron de Tibor SEKELJ *Elpafu la Sagon*, kuraĝigante min, ke mi bone legu kaj esploru la meritoplenan personon. Li fakte havis intiman kontakton kun T.S. Estas interesa la komparo inter Laŭlum, homo kiu vivis kvazaŭ nur por Esperanto, kaj Tibor SEKELJ, kiu elstaris almenaŭ en pli ol dek fakoj. Sed en miaj okuloj, ili same brilas en la E-movado, en la historio de la homa civilizo.

El la landoj kaj sekcioj

Ĉeĥio

Kelkaj notoj pri instruado de lingvoj, precipe de E-o, en bazlernejoj

De la pasinta lernoĵaro estas en bazlernejoj kaj mezlernejoj instruataj du fremdaj lingvoj. Preferata kiel la unua lingvo estas la angla de la tria klaso. La plua fremda lingvo estas instruata en la 7-a, 8-a kaj 9-a klasoj. S-ano Viktor DVOŘÁK iniciatis laborgrupon por ebligi envicigon de Esperanto en la grupon „plua fremda lingvo”.

Por Esperanto estis ellaborita „Standard”, norma programo (kia ekzistas por ĉiu instruata lingvo), kiu difinas sciojn de lernantoj fine de ĉiu lernoĵaro. Por ĝi estis uzata la lernolibro de Stano MARČEK „Esperanto per rekta metodo”. Laŭ ĝi estis ellaborita ankaŭ insruprogramo por la lastaj tri klasoj de bazlernejoj. Do, la materialoj estas preparitaj. Pri tio, kiu lingvo estos instruata kiel plua (la dua) fremda lingvo, ne decidus la ministerio, sed la

direktoro de lernejo. Kaj lia decido estas influata de la intereso de la lernantoj, aŭ pli precize, de iliaj gepatroj kaj de tio, ĉu por la lingvo estas instruisto. Tiuj du aspektoj estas la ĉefaj problemoj. Instruistoj aŭ instruantoj de Esperanto en Ĉeĥio estas fakte amatoraj, ĉar ne estas ĉe ni eblo, kie akiri akreditecon por instruado de Esperanto. Kompreneble, estas kursoj en Universitato Adam Mickiewicz UAM en Poznano (PL), sed mi konas neniun en Ĉeĥio, kiu povus aliĝi al tiu studado. Eĉ se estos instruisto (nun ne estas tiom strikte postulata la akrediteco), estus preskaŭ miraklo, se inter la gepatroj estus tia intereso pri instruado de E-o, ke la direktoro decidus instrui ĝin kiel la duan lingvon.

Tamen estas grave havi preparitajn materialojn por la instruado de E-o. Verŝajne en ĉiuj landoj de EU estos similaj postuloj, do necesos havi ian norman programon kaj lernolibron kun instruplano, ankaŭ elektitan instrumentodon. Tiam estus bone pritrakti, kiun libron rekomendi. Tiu de Stano MARČEK, kiu ekzistas en multaj lingvaj variantoj kaj ĝuste la uzata rekta metodo, estas rekomendinda. Tion devus pripensi kaj landaj sekcioj de ILEI kaj landaj asocioj por unueca preparo de instruado de E-o. Tial mi sendas ĉi tiujn notojn por diskuto en UK en la programo *Tago de Lernado* en Nitra en Slovakio kaj plua komuna traktado dum la ILEI-Konferenco en Nyíregyháza, Hungario.

Josef VOJÁČEK

Francio

Michel Duc-Goninaz (1933-2016)

Mi memoras la surprizon de mia katedrestro pri rusa lingvo en la universitato de Aix en Provence (Francio), kiam alvenis nova docento el Parizo, kiu salutis min „Saluton, Renée, kiel vi fartas?“, ĉar neimageblas, ke simpla studentino jam konas profesoron! Simple li ne sciis, ke Michel estas e-isto kaj krome, amiko de mia bofrato, ankaŭ e-isto, André BOURDEAUX. Post studoj en la prestiĝa pedagogia seminario en Parizo kaj staĝo en la universitato de Moskvo, Mišel instruis la rusan lingvon en duagrada lernejo



en Pariza regiono antaŭ ol enposteniĝi en suda universitato. Tie li evidente instruis la rusan, sed li oficialigis E-kurson, kiu donis ekzameneron (UV = valorunuoj) por iu ajn licencio (D4). Ec se li ne estis movadano, li tamen


servis E-on, kiel membro de la Akademio, sed ĉefe per verkado de artikoloj pri E-o en lingvistikaj revuoj aŭ simpozioj. Ni notu lian vortareton, kiu grupigas la vortojn laŭ la ideoj en la franca kaj Esperanto en konata eldonejo, Ophrys. Samtipe libron li verkis pri la rusa (lasta reeldono en 2015). Li plurfoje gvidis staĝojn (en Usono ekz.) aŭ ĉe SUK (Someraĵ Universitataj Kursoj 1974 en la universitato de Lieĝo, Belgio). Sed lia ĉefa kontribuo restas la aktualigo de PIV, pro kiu li devis mastrumi la kunlaboron de plej diversaj homoj laŭ du teknikoj: papera kaj komputila . Al lia Esperanto-parolanta familio, IPR kondolencas.

Renée TRIOLLE

Hungario

Pedagogia Tago en Budapeŝto

La 13-an de februaro 2016 la hungara sekcio organizis jaran kunvenon. Ni havis asembleon, József NÉMETH raportis pri la pasintaj du jaroj kaj helpe de advokato ni modifis la statuton (ankaŭ la ĝisnuna, unupaĝa estis bone funkcia, sed pro la ŝanĝigo de la hungaraj leĝoj, ni devis revizii ĝin, kaj nun ĝi ampleksas pli ol 13 paĝojn). La saman tagon ni havis ankaŭ pedagogiajn programerojn. Stefan MACGILL prelegis pri la ĝisnunaj atingoj de AMO (Aktivula Maturigo). Prelegis Pál GAJDOS kun la titolo „La rolo kaj



signifo de la Hungaraj popolkantoj en la E-a kurso kaj en la E-a movado”, li ankaŭ kantigis nin (vd surfote). Pálma SALOMONNÉ CSISZÁR informis nin pri la ŝanĝoj en la hungara lingvoekzamena sistemo, kaj kun gvido de Enikő SEREGHYNÉ ZENGŐ ni preparolis la farendaĵojn prepare al la 49-a Konferenco de ILEI en Nyíregyháza.

La eventon partoprenis ĉ. 25 kolegoj. (Bedaŭrinde la saman tagon, samurbe, okazis neantaŭvidebla manifestacio de hungaraj pedagogoj, kelkaj pro tio malfruis aŭ ne povis veni al nia programo).

Jozefo NÉMETH

Rusio

Vica KER-sesio en Moskvo

La 16-an de aprilo 2016 en Moskvo sukcese okazis la 5-a Tutmonda KER-ekzameno. Fakte en Moskvo la sesio estis organizita jam la 6-an fojon. Antaŭ kelkaj jaroj ni havis eksterordinaran ekzamenon por granda grupo de

dezirantoj, precipe de la nivelo C1, kiun akceptis K. KOVÁTS kaj R. CORSETTI. Ĉi-foje ni havis eblon organizi la sesion en la perfekta ejo de la Centro de pedagogia majstreco. Hela, vasta klasĉambro kun dudek tabloj kaj seĝoj bonege influis kaj instigis la laborhumoron. La skriban ekzamenon partoprenis 10 diversaj personoj el Moskvo, Apudmoskvo kaj Kazano. La unuan fojon ni havis inter la ekzamenatoj 2 lernejanojn, unu el kiuj kuraĝis por la nivelo C1!



La ekzamenatmosfero estis trankvila, hejmeca, tre agrabla kaj entuziasmiga. Kvankam ekstere forte pluvegis, eĉ neĝis, la humoro estis tute bona! La koverton kun testoj solene malfermis Nikolao Gudskov – la vicprezidanto de REU, ĵus elektita al Akademio de E-o. Al la partoprenantoj bondeziris kaj detale informis pri la proceduro Svetlana SMETANINA – prezidanto de REU, reprezentanto de ILEI en Rusio. Dum la ekzameno eblis kafumi, teumi, manĝeti diversajn abundajn bongustaĵojn. Tamen, ĉiuj laboris tiom serioze kaj diligente, ke neniuj eĉ aliris la manĝotablon dum la unuaj 2 horoj! Ĉiuj partoprenantoj finis siajn laboraĵojn antaŭ la indikita tempo, kvankam ĉi-jare la testoj por ĉiuj tri niveloj (B1, B2, C1) estis multe pli komplikaj ol en la antaŭaj sesioj. Post la fino de la ekzameno Irina GONĈAROVA intervjuis la partoprenintojn pri la ekzameno, impresoj, malfacilaĵoj ktp por la filmeto de la „Esperanto - Pervij kanal”. Iom lacaj, sed kontentaj kaj esperantaj pri la sukcesa ekzameniĝo, jam en suna posttagmezo, ni disiĝis.

Svetlana SMETANINA, ĉeforganizanto de la KER-sesio

Serbio

TEREZA KAPISTA (1930-2016)

Tereza KAPISTA, prezidantino de Beograda Esperanto-Societo, mondkonata esperantistino, hodiaŭ foris en rememoro.

Ŝi estis esperantistino, instruistino de la internacia lingvo Esperanto, hungarino el Serbio, sed monda civitanino. Ŝi travojaĝis la „tutan mondon”, multajn landojn sur kvin kontinentoj, instruante al homoj la lingvon Esperanto. Profesie ŝi estis emerita juristino, krome ŝi estis mondvojaĝanto, konata



Esperanta instruistino. Ŝi instruis per rekta metodo. Eble ne ĝuste laŭ la reguloj de la Haga Internacia Esperanto-Instituto, laŭ la Marĉeka lernolibro, Zagreba metodo – ŝi kombinis ĉiujn tiujn manierojn de lernado kaj faris propran metodon, miksaĵon de ĉiuj, esploratan en la praktiko en dudeko da landoj, en kiuj homoj parolas pli ol dudeko da lingvoj. Estas interesa la fakto ke, laŭ reagoj de la instruataj homoj, ŝi ĉiam sukcesis. Okazadis tiuj ŝiaj instruhoroj en tre diversaj lokoj, en modernaj lernejoj, en skoltaj tendaroj, en kabanoj, en klerigaj centroj, inter infanoj, iranaj virinoj, afganaj rifuĝintinoj, malriĉaj burundaj knaboj, inter hungaroj, serboj, rusoj, turkoj, bosnianoj, brazilanoj, novzelandanoj – mi ne povus nombri ĉiujn kiuj estis ŝiaj ĝelernantoj kaj kiuj nuntempe estas ŝiaj ĝeamikoj.

Ŝi naskiĝis en Subotica la 11-an de aprilo 1930. Ŝi esperantiĝis en la jaro 1985. En Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando, ŝi akiris Cseh-metodan instruistan diplomon, estis D kaj FD por Cseh-metodo de UEA. Ŝi laboris kaj estas emerita kiel juristino, sed ankaŭ finis Pedagogian Akademion. Ekde 1996 ŝi estis vicprezidanto de Beograda Fervojista Esperanto-Asocio. Ŝi ĉeestis Universalajn Kongresojn dek-foje, ILEI-kongresojn 7-foje, SAT-kongresojn 9 fojojn, IFEF-kongresojn 12-foje... En multaj kongresoj ŝi prelegis kaj gvidis kursojn. En la kursoj komence ŝi instruis laŭ la *Zagreba metodo*, poste laŭ *Cseh-metodo* kaj foje laŭ *Gerda malaperis*. Eksterlande ŝi gvidis kursojn en Hungario, Germanio, Francio, Nederlando, Italio, Brazilo, Pollando, Aŭstralio, Nov-Zelando, Ukrainio, Turkio, Japanio... pli ol 130 diversajn kursojn de diversaj niveloj. Entute ŝi vizitis 54 landojn (en ĉiuj kontinentoj) ĉiam farante ion por E-o.

Ŝi okupiĝis ankaŭ pri eldonado. Ŝi aperigis propran tradukon al E-o de la libro de Tibor SEKELJ „*Temuĝin, la filo de la Stepo*” (1993), la libron de Branimir SĈEPANOVIĆ „*Buŝo plena je tero*” (1994), kiun elserbigis Antonije SEKELJ, verkis librojn: „*Esperanto, lingvo de paco en Irano – Azio*” pri la

realigita projekto de UEA, „*Esperanto, lingvo de paco en Burundo – Afriko*” (eldonis en 2005 proprakoste), *Je pri io* (2012).

Plurfoje ŝi korektis tekstojn de E-tradukantoj, ankaŭ helpetis iom en Nova PIV, kiun eldonis SAT en la jaro 2003. En 2005 ŝi estis la redaktoro de poemkolekto „*Miozoto*” de Margarethe-Greta STOLL. Ŝi estis ano de Pasporta Servo, gastigis multajn amikojn el Koreio, Japanio, Rusio, Turkio, Hungario, Rumanio, Italio, Bulgario, Germanio, Pollando, Francio, Aŭstralio, Nov-Zelando, Ĉinio ktp. En 2008 ŝi tradukis al la serba la lernolibron „*Esperanto laŭ la rekta metodo*”, verkitan de Stano MARČEK.

Dimitrije JANIČIĆ

Post longa scienca esploro kaj laboro, aperis granda verko de dr-o profesoro Jozo MAREVIĆ, kiu riĉigas kulturon kaj sciencon en Kroatio kaj aldonas grandan valoron al la lingvo Esperanto. Aperis:

Internacia projekto finita kaj la vortaro presita fine de februaro 2016


OKLINGVA MEDICINA VORTARO ENCIKLOPEDIA

Lingvoj: *la latina, la angla, la franca, la germana, la hispana, la itala, Esperanto kaj la kroata*

*Recenzo de Marija JERKOVIĆ
(Kroatio)*

La projekto estas imagita tia-maniere, ke la vortaro ne estu tro enciklopedia kaj faka sed pure informa, ĉar oni konsideras, ke eblaj hodiaŭaj uzantoj bezonas, fakte kaj ĝuste, verajn nuntempajn orientadajn informojn.

La medicinaj sciencoj, la medicino ĝenerale, kiel primara humanista scienco, hodiaŭ kunkreskas kun la homoj, kun iliaj vitalaj bezonoj, kun ilia sano, unuvorte kun ilia destino. La latina lingvo, kiel ĉefa kaj fundamenta, estas la elira lingvokolono, ĉar ĝi estas baze enfiksita en



multajn aliajn eŭropajn lingvojn kaj metalingvojn, antaŭ ĉio en la medicinan lingvon. Aliflanke, la latina lingvo enradikiĝis en ĉi tiujn unuopajn lingvojn kiel ekz. la francan, la italan, la hispanan, la rumanan, la romanĉan, la katalunan...

Ĉar la medicina nomenklaturado estas plejparte grekdevena, por ĉiu tia kapvorto estas klarigita la originala signifo greklingva.

Apud ĉiu nocio oni alportadas la grekan, ofte ankaŭ la latinan etimologion, kie kaj kiam oni bezonas tion fari. Tiamaniere, la klasikaj lingvoj (t.e. la greka kaj la latina) „kovradas” signifojn de multaj modernaj scienckampoj, medicinaj sciencoj, novtempaj malsanoj kaj kuracadoj, sciencaj bezonoj.

Laŭ kontrasta paralelo de la prilaboritaj lingvoj, en ĉi tiu medicina vortaro respuguliĝas la abundo de komunaj elementoj, per kiuj la lingvoj de la vortaro estas interligitaj en la tutaĵo de eŭropa esprimo.

En la vortaro estas uzata la mallongigo *ilo*. Kial? Longtempe resonadas tiu mallongigo, kiun enkondukis la jam forpasinta Helmar FRANK, la plej konata kibernetikisto el la esperantistaro (lia mallongigo ILo signifas Internacia Lingvo, latine *Internationalis Lingua*). Dua fortega persono, ege grava kaj tutmonde konata juristo, vivinta longtempe en Londono, naskita en Split kaj preskaŭ neanstataŭebla homo en internacia Esperanta movado, multjara prezidanto de UEA, Ivo LAPENNA, same uzis tiun esprimon. Sekve, la elektita mallongigo *ilo* estas viva memoraĵo al ili.

Ĉu aldoni ankaŭ ILon en vortaron, la aŭtoro antaŭ kelkaj jaroj tute ne pripensadis la eblecon ellasi ĝin, ĉar se oni demandus esperantistojn, li estas tucerta, ke ĉiuj respondus: **JES !!!**, en la vortaron nepre aldoni ILon.

Pro tio, por ellaborado de la **Esperantlingva parto, same kiel por aliaj lingvoj**, enskribitaj ĉi tie, li bezonis pliajn fakulojn: *kunaŭtorojn, redaktorojn, korektistojn...*

La vortaro enhavas minimume 50 000 kapvortojn (el la medicina kampo kaj rilataj kampoj), ĉirkaŭ 500 mallongigojn, 3 152 paĝojn.

„Aliaj detaloj de la projekto sendube estos pridiskutitaj multfoje”, estas la vortoj de la granda sciencisto kaj esperantisto, Profesoro D-ro Jozo MAREVIĆ.

Por via notlibro

HELPU al IIK!

La 45a Internacia Infana-junula Kongreseto okazos fine de julio 2016 en Nitro, dum UK kaj proksime de la UK-ejo.

IIK bezonas pli da infanoj, inkl. komencantojn kaj infanetojn kun la gepatroj. Informoj rete en: bertosch.free.fr/iik2016

Bonvena nova reta Esperanto-kurso



Fame konata estas la unua Esperanto-kurso www.lernu.net. Daŭre ĝi funkcias sukcese. Funkcias Duolingo surbaze de la angla, baldaŭ ankaŭ surbaze de la hispana (junie 2016).

Fame konata estas la lernolibro *Esperanto per rekta metodo* de Stano MARČEK. Ĝi ekzistas nun en 36 lingvoj. Jen anonco pri ĝia apero en la reto.

La aŭtoro Stano MARČEK anoncas sur sia blogo:

En la revuo *Esperanto*, februaro 2016, rubriko „*Reliefe*”, p. 33, aperis artikolo de Piet BUIJNSTERS el Nederlando pri la

preparata kurso de *Esperanto per rekta metodo* por poŝtelefonoj, projekto de Internacia Esperanto-Instituto en Hago. Vi simple per via poŝtelefono povas elŝuti la „apon” kun la nomo „*Esperantocursus/Esperantokurso*” el la apobutiko de *Google Play store*. Vi ne bezonas pasvorton. Serĉu la apon per la serĉfenestreto.

Ĉe Google-butiko senpage elŝuteblas la aplikaĵo por telefonoj: <https://play.google.com/store/apps/details?id=com.embarcadero.esperanto>, sed ĝi troveblas ankaŭ ĉe pli simpla plusenda adreso: www.iei.nl/apo.htm, resp. *Esperanto course: app for Android smartphones*.

Viaj rimarkoj estas tre bonvenaj al pbuyn@planet.nl aŭ petrobrunido@gmail.com aŭ iesperanto@versatel.nl

Vidu ankaŭ: www.ipernity.com/doc/stano.marcek/41235728

'Kapabligo' komune kun UEA

La temo 'Kapabligo' okupis du horojn el la planitaj 18 horoj da kunsidado de la Estraro de UEA en Roterdamo inter la 23-a kaj 25-a de aprilo 2016. Reale estraranoj laboris signife pli ol tiujn 18 horojn – unu sesio finiĝis je la unua horo matene. La mastruma teamo daŭrigis la laboron tra la 26-a de aprilo. La plimulton el la kapabluga diskuto partoprenis skajpe la prezidanto de ILEI, Mirejo Grosjean. Grava temo estis la komune proklamita *Jaro de la Lernanto*, lanĉota kadre de la *Tago de Lernado* marde en la UK en Nitra. La *Jaro* ricevos detalan trakton en la 49-a Konferenco de ILEI en Nyíregyháza tuj post Nitra. Aliaj renkontiĝoj plekteblaj en la *Jaron* estas la Universitata Kolokvo en Timișoara, Rumanio (11-13 novembro 2016) kaj AMO-seminario en Svislando en majo 2017 – la unua seminario pri *Aktivula Maturigo* (AMO) kun eksplicite eduka ĉeftemo. La konferenco en orienta Hungario, kaj la *Jaro* entute donos grandan atenton al novaj lernformoj kaj manieroj ligi nin al retaj kursfinintoj. Alia celo de la *Jaro* estas fortigo de universitata kunlaboro, ĉu neformale, ĉu pere de komuna komisiono de ILEI, UEA kaj CED.

Stefan MACGILL

La 49-a konferenco de ILEI

Kial ni ĉendancu baladojn?

Nova evento en nia Konferenco

Ĉu tradicio el pratempo, kiu travivis en angulo periferia de Eŭropo, povos fariĝi parto kaj eĉ grava riĉaĵo de nova kaj tutmonda kulturo?

Ferooj estas insularo en Atlantika Maro, inter Islando, Norvegio kaj Skotlando. Tie vivas kelkdek mil feroanoj, kies lingvo estas dialekto de la pranorvega kaj kies reĝo jam de antaŭ 500 jaroj estas tiu de Danujo. En Feroaj Insuloj oni dancas baladojn multajn, longajn, kelkajn tre malnovajn pri herooj de pratempo. La balada kulturo kontribuis al tio, ke la feroa lingvo daŭre kaj vigle vivas malgraŭ eksteraj influoj. La etoso de bona balado povas fari fortan impreson. Ekz. finno responde al mia blogero pri „Balada somero” diris, ke li ankoraŭ memoras kiam li, junulo, antaŭ 50 jaroj unufoje dancis feroan ĉendancon. Kaj li ne estas sola. Aliaj simile komentis, ekz.: „Jes, mi memoras tiun dancon ĉar, kiam mi estis infano, unufoje feroano venis al nia lernejo kaj instruis ĝin al ni.”



(foto de Eileen Sandá, el Wikipedia)

Kolego rakontis: „Ni iris per ŝipo de la norvega haveno Bergen al Islando, pasante tra Ferojoj. Estis iom blova vetero, sed la ŝipo sufiĉe bone iris, ne tro grandaj estis la ondoj. Ne estis multo por fari en la ŝipo, do iom enue dum tiuj kelkaj tagoj. Inter ni estis ankaŭ feroanoj, irantaj hejmen. Mi unue ne komprenis, kion ili faras. Sed ili ĉendancis. Dum la tuta vojaĝo ili ĉendancis, ĝis ni alvenis al Tórshavn. Iuj el ili ankaŭ foje iris dormi, sed la danco ne finiĝis.”

Utilo

Por Esperanto, balado povas plenumi plurajn funkciojn samtempe:

- Ĝi povas kontribui al agrable intensiva etoso de homa kunesto dum kaj lokaj kaj internaciaj kunvenoj, kongresoj kaj junularaj tendaroj en Esperantujo. Ĉendanco balada estas bonega kombino de kuneco, kantado kaj ritma moviĝo.
- Ĝi povas esti bona ekzerco lingva por komencantoj aŭ tiuj, kiuj malofte havas okazon paroli E-on en sia proksima ĉirkaŭaĵo. Ripetante baladan tekston oni samtempe ekzercas sin pri kaj elparolo kaj vortaro kaj gramatiko.

- Trie, verece verkita nova balado povas esti bona historia instruo al parolantoj, kiuj ofte havas maltaŭgajn sciojn pri la historio de Esperanto kaj pri la herooj de nia movado.

Avantaĝoj

- Kial ĝuste ĉi speco de danco estas tiom bona ĝuste por Esperanto?
- La dancopaŝoj estas facilaj, do lerneblaj por homoj el diversaj kulturoj. La danco tamen ne fariĝas enua, pro la kantado kaj pro la „malebena” takto (du sinsekvaj strofoj ne komenciĝas je dance sama paŝo).
- La ĉeno ne estas pariga kaj sendependas je sekso, aĝo kaj aliaj apartaĵoj. Oni ankaŭ ne devas esti sportulo por danci ĝin. Tenante unu la alian per manoj, oni estas simple amikoj, kiuj baladas kune.
- Lerni kaj parkerigi baladan tekston estas bona helpilo por lerni kaj memori la lingvon. Tio estas interesa ankaŭ por lingvokurso aŭ – ekzameno.
- Ne necesas, ke baladestro kapablu bele kanti. Sufiĉas laŭte kaj ritme paroli, tiel ke ĉiuj aŭdu la vortojn. Baladon oni ne vere kantu, sed recitu, tio estas „dirkantu” aŭ „kantvoku”.
- Oni ne bezonas ilojn. Sufiĉas, ke estu dancemaj homoj kaj loko kun taŭga planko. (Kaj iu devas esti baladestro – antaŭkantanto kaj gvidanto).
- Dum la danco, eĉ en longa ĉeno, oni renkontas vidalvide la aliajn dancantojn en vico, unun post alia. Tio estas taŭga ekzemple por interkona vespero. (Ekzemple estas verkita nova „Interkona balado”).
Kiu ajn parkerigas baladon, aŭ eĉ nur parton de longa balado, tiu povos mem konduki ĉendancon en kunveno.

Sed kiajn baladojn?

Balado estas rakonto, kiun oni dancas. Normale ĝi havas melodion, rekantaĵon kaj minimume kvin strofojn. Kolektataj estas jam ĉirkaŭ cent baladoj diverslongaj tradukitaj el la feroa, iu skandinava, la hungara, rusa (Puŝkin), ĉina, kartvela, litova, pola (Sinjoro Tadeo), germana, angla kaj aliaj lingvoj. Krome, pli granda nombro da bonaj originale esp-aj poemoj nun estas baladoj, kun melodioj kaj rekantaĵoj ĉu novaj ĉu pruntataj el feroaj, ekzemple kvardek Ezopaj fabloj de Kalocsay. Inter ili estas humoraj, tragikaj, dramaj, heroaj kaj historiaj baladoj, tre diversaj ankaŭ laŭ longeco kaj aĝo. Por kompreni pri kio temas, se vi havas interreton, rigardu ĉendancon feroan (ĉiuj tiuj kvar baladoj estas jam tradukitaj en E-on):

<https://www.youtube.com/watch?v=I47Nd0n9DsQ>,

<https://www.youtube.com/watch?v=DXN1c11ZyqI>,

<https://www.youtube.com/watch?v=IL3e8doV9kI>,

kaj https://www.youtube.com/watch?v=Bts_v9mqv3g aŭ
<https://www.youtube.com/watch?v=BJ--Uw7a0tk>.

Vizio

Mi havas revon. En mia revo ĉiu dua aŭ tria espo³ parkerigas baladon, longan aŭ mallongan, kaj kapablas konduki ĝin ĉendanco. Iuj parkerigas plurajn baladojn. Tiaj baladaj ĉendancoj fariĝos tipa specialaĵo de espaj kunvenoj ĝenerale, kio allogas ĉiam pli da homoj al la movado kaj fortigas ĝian senton de kunesto kaj kunfarado. La verkado de baladoj fariĝas grava flanko de la literaturo kaj poezio de E-o. La baladoj temas pri ekzisto ĝenerale, movada vivo, historio kaj diversaj aventuroj. Per la baladaj rakontoj homoj komprenas la mondon iom pli bone, inspiriĝas al aktualaj defioj kaj ĝojas kaj ridas kune. E-istojn oni rimarkas per tio, ke „ho, estas tiuj kiuj ĉendancas baladojn”.

– „Ankaŭ mi volas tion! Ĝi aspektas tiel mojose.”

– „Ĉu?”

– „Jes!”

– „Do lernu Esperanton.”

Kaj oftigas la kutimo, ke kulmino de ekzameno en Esperanto-kurso konsistas el tio, ke ĉiu lernanto mem elektas, parkerigas kaj estras en komuna ĉendanco baladon. Tiel eĉ timiduloj kuraĝiĝas por havi fortan voĉon kaj eldiri ne nur poemon sed ankaŭ sian opinion, eĉ pri lingvaj kaj aliaj homaj aferoj kaj tiel plu, eĉ inter fremduloj.

Lernu!

Kurson „Ĉendancu baladojn” mi faras por lanĉi ĉi-novan kulturfenomenon en E-ujon, por ke homoj lernu la dancon kaj por ke kelkaj – aŭ prefere multaj – kuraĝu mem fariĝi baladestroj. Unu kursejo estos la ILEI-konferenco en Nyíregyháza inter la 30-a de julio kaj 6-a aŭgusto 2016. Venu provi!

Martin STRID, svedespo

Farandolo en Nyíregyháza

Kunportu longan blankan tukon „*hachimaki*”

Nomo: Surstrata farandolo (gaja procesio, dancada irado), kie ĉiu partoprenanto surhavas *hachimaki* kaj eble kantas, aŭ ripetas skandinavan poemon....*Hachimaki* estas tuko, kiun oni surhavas sur la frunto ĉirkaŭ la kapo. Sur la tuko oni skribas ion; la surhavo de tia rubando signifas por

³ *Espo (lingvo- aŭ etnosufikso): esperantisto*

japanoj (bv korekti, kaze ke mi ne bone komprenis...): mi atingos mian celon kun certeco. Ekz.: japanaj studentoj surhavas tion preparante siajn ekzamenojn.

Celo: konigi Esperanton, ekz al la hungaroj en Nyíregyháza. Tiuĉelen ĉiu devus skribi sur sia rubando la nomon de sia denaska lingvo, de siaj denaskaj lingvoj, en la hungara kompreneble.

Ĝenerala priskribo: ĉiu partoprenanto de la Konferenco venu al Nyíregyháza kun blanka tuko. Dimensioj: 90 x 33 cm. Oni faldas ĝin por obteni 7 cm larĝan rubandon. Oni nodas ĝin malantaŭ la kapo. Ĉiu pentru la nomon de sia denaska lingvo en la hungara. Tiel vidante la farandolon hungaroj en la publiko povos tuj konstati, ke tie estas ruslingvano, tie japanlingvano, tie hispanlingvano, kaj ke ni ĉiuj kapablas interkompreniĝi per E-o.



Tiu uzo de *hachimaki* estus tre simbola, ĉar ĉiu uzas sian denaskan lingvon en sia kapo, dum pripensado. Do la tuko MONTRAS tion: Tiu kapo funkcias per tiu lingvo! Ĉiu havu blankan *hachimaki*, do la tuta anaro aspektos iel sama, unueca. Ni inundu la piedirantan centran zonon de Nyíregyháza per gaja farandolo.

Buĝeto: Ĉiu alportu blankan ŝtofon. Kosto: eĉ ne unu eŭro. Oni bezonas apartan skribilon por skribi sur tuko kaj por povi poste lavi la tukon. Mi pretas alporti kelkajn tiajn al Hungario.

Kunlaborantoj: ĉiu faru por si mem. Facila kaj mallonga preparlaboro. Hungaroj devus liveri al la partoprenantoj liston kun la nomo de lingvoj en la hungara.

Rimarkoj: Ĉu vi bezonus kuraĝon por partopreni tian publikan dancadon? Mi ne! Tute senproblema ago por mi. Tamen mi scias, ke mi tute aĉe dancadas... laŭ brazilaj gesamideanoj... Tia farandolo jam okazis kadre de la

UK en Kopenhago, DK (vd. la foton sube). Tiu farandolo okazos lige kun dancado de baladoj sub la gvidado de Martin STRID.



Mireille GROSJEAN

La 49-a konferenco de ILEI

Loĝprezoj kaj mendilo

Preztabelo

	Priskribo (pliaj detaloj post la preztabelo)	Unu nokto / unu persono:	7 noktoj: 30/7 - 6/8/2016
L1	BESSENYEI HOTEL	prezoj en EUR	prezoj en EUR
L1.1	Duĉambra 4-lita apart-amento por unu persono	29.00	203.00

L1.2	Dulita ĉambro por unu sola persono	15.50	108.50
L1.3	Unu lito en dulita ĉambro (4 en apartamento)	12.50	87.50
L2	Studenthejmo		
L2.1	Duĉambra 4-lita apart-amento por unu persono	25.00	175.00
L2.2	Dulita ĉambro por unu sola persono	13.00	91.00
L2.3	Unu lito en dulita ĉambro (4 en apartamento)	11.00	77.00
L3	Hotelo Tölgyes		
L3.1	Dulita ĉambro por unu persono, kun matenmanĝo	62.00	434.00
L3.2	Unu lito en dulita ĉambro (2 personoj en unu ĉambro) kun matenmanĝo	32.00	224.00
L3.3	En ĉambro kun aldona lito (3 personoj en unu ĉambro) kun matenmanĝo	31.00	217.00
L3.4	Duonpensiono en unupersona ĉambro	72.00	504.00
L3.5	Unu duonpensiono en dulita ĉambro (2 personoj en unu ĉambro)	42.00	294.00
L3.6	Unu duonpensiono en ĉambro kun aldona lito (3 personoj en unu ĉambro)	41.00	287.00
L4	Alia hotelo		
L4.1	Helpo de LKK rezervi lokon en alia hotelo	5.00	5.00

L1. Bessenyei Hotel (Universitata hotelo „Beŝenjei”)

Apartamentaj ĉambroj: apartamento konsistas el du dultitaj ĉambroj kun komunaj antaŭkoridoreto, kuirejeto, duŝejo kaj necesejo; sen matenmanĝo; kun WiFi-retkonekto.

L2. Campus Kollégium (Studenthejmo)

Apartamentaj ĉambroj: du dultitaj ĉambroj kun komuna antaŭkoridoreto en unu apartamento, sen matenmanĝo.

Rimarkoj:

Ambaŭ, hotelo BESSENYEI kaj studenthejmo troviĝas en la universitata komplekso de konstruaĵoj, koridore kunligitaj kun la konferencejo.

Por mendoj kaj antaŭpagoj post la 20-a de julio kaj por mendoj sen konfirmita antaŭpago ILEI ne garantias loĝlokon en la hotelo Bessenyei kaj studenthejmo.

L3. Hotelo Tölgyes

Dultitaj ĉambroj kun matenmanĝo aŭ duonpensiono. En ĉiu ĉambro: duŝejo, harsekigilo, klimatizilo, mini-trinkbufedo, TV, telefono, senpaga retkonekto (WiFi). Senpaga parkejo. Bufeda matenmanĝo estas inkluzivita en la prezo. Eblas rezervi ankaŭ duonpensionon, ĉu kun tagmanĝo ĉu vespermanĝo.

ILEI rezervis tie 7 dultitajn ĉambrojn por la konferenca semajno, kiuj povas esti uzataj unupersono, dupersono, aŭ kun aldona lito - tripersono, do minimume 7 ĝis maksimume 21 konferencanoj povos loĝi tie. ILEI akceptos mendojn kaj antaŭpagojn por la hotelo **Tölgyes** ĝis ĉiuj lokoj estos elĉerpitaj, sed ne post la 24-a de julio. Por mendoj kaj antaŭpagoj post tiuj tempolimoj kaj por mendoj sen konfirmita antaŭpago ILEI ne garantias loĝlokon en ĉi tiu hotelo.

Rimarko: Hotelo **Tölgyes troviĝas je promendistanco de la konferencejo.**

L4. Alia hotelo

Se vi deziras loĝi aliloke kaj bezonas helpon de LKK por trovi alian hotelon, bonvolu mendi tiun servon kontraŭ 5 EUR. Tiukaze vi pagos la loĝprezon rekte al la hotelo kiun vi elektos laŭ la kondiĉoj de tiu hotelo.

Loĝmendilo (rete: https://docs.google.com/forms/d/10Claz1M6u97YoZco0yheMIC2T8nl2Lg0EIxXP_ukKgg/viewform)

Konferenca numero: _____ Plena nomo _____

Loĝopcio (elektu unu el L1.1 - L4.1 laŭ la preztabelo) _____

Enirdato: _____ Elirdato _____

Nombro de noktoj ____ Prezo de: unu nokto _____ tuta mendo _____

Ĉu vi komprenas kaj akceptas la mendokondiĉon, ke: La mendo validas kaj la ĉambro estos rezervita por vi nur post konfirmita pago de la kompleta loĝprezo? (JES/NE) _____

Pagmaniero (elektu unu):

- (1) Al ILEI-konto ĉe ING-banko, IBAN: NL55INGB 0004676855, BIC: INGBNL2A, kun indiko: "Loĝado 2016". Aldonu 5 EUR se vi pagas de ekster Eŭropa Unio.
- (2) Al ILEI-konto ĉe UEA ilek-a, indikante "Loĝado 2016".
- (3) Ene de Hungario (EUR, aŭ egalvaloro en HUF laŭ la aktuala kurzo en la momento de pago): al bankkonto de Verda Stelo Egyesület, 6880 0109 1113 0118 0000 0000 ĉe Szabolcs Takarékszövetkezet.

Mi deziras loĝi kun: _____

Komentoj: _____

Bonvolu sendi la mendilon al la kasisto de ILEI, kopie al la estrarano pri konferencoj. Se vi povas, prefere uzu la retmendilon.

Radojica PETROVIĆ, estrarano pri konferencoj

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prezidanto), Mireille Grosjean (vicprez.), Christophe Chazarein, Mónika Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Monique Arnaud, Synnöve Myntinnen.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: Mireille Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat. Estrare: Gong Xiaofeng „Arko”.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (Edukado ĉe Interreto): Vítazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj
Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando.
Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsofia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Arina Osipova**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org.

Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Stefan MacGill**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Rezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por *Juna amiko* akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj banko-kostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la

nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.



Limo sur strato en Les Brenets, Svislando (vd artikolon sur p. 9)

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Belgio, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktoro:** NÉMETH József, Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-70) 931-0530.

La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando, <moerbeekr@gmail.com>.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de majo 2016,
redaktofino por la sekva numero: la 20-an de aŭgusto 2016.**



Kvin hungaraj esperantistinoj kune dum TTK 2015
(de maldekstre): Zsófia KÓRÓDY, Ilona KOUTNY, Márta KOVÁCS,
Katalin KOVÁTS, Mónika MOLNÁR



Instruista grupo prepariĝas al la ekzameno en Poznano (vd. p.4)

